# Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

## 2023.1

**La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn**




# Centra stacidomo Roterdamo

## Estimataj gelegantoj

Post du jaroj de limigita agado de niaj membroj kaŭzita de kovidpandemio estas la pasinta jaro denove pli favora por ni. Denove estis organizata surloka kongreso, jam la 73-a, en Beroun, Ĉeĥio. Ni povis renkontiĝi surloke kaj ĝui amikan etoson dum komunaj aranĝoj – kunvenoj, prelegoj, koncertoj, ekskursoj kaj dum libera tempo. Laŭ asocia regularo estis elektita nova IFEF-estraro (en malnova konsisto) kaj estis akceptataj gravaj decidoj. Antaŭvideblas ankaŭ daŭrigo de tradiciaj IFEF-kongresoj – en Majo 2023 ĝi okazos en Antverpeno, Belgio. Niaj belgaj kolegoj en LKK zorgeme laboras por efektivigi ĝin tiel, ke ĝi plaĉu al vi. La urbo Antverpeno mem estas belega kun multaj interesaĵoj kaj memorindaĵoj. La kongresejo, kiu troviĝas en la centro de la urbo estas moderna, ĝi ofertas bonajn kondiĉojn por loĝado, kunvenado, laboro kaj amuzo. Dum ekskursoj vi konatiĝos kun la beleco de la urbo kaj la proksima ĉirkaŭaĵo. La postkongresaj tagoj celas al *Charleroi* en Valonio kun interesa programo.

La jaro 2022 alportis al ni ankaŭ malfeliĉajn okazaĵojn – precipe militon en Ukrainio, kiu influas nin en niaj pensoj kaj ankaŭ per siaj postsekvoj. Ni devas kredi, ke finfine venkos sana prudento post tiel longa kaj senbezona sufero.

Nia federacio estis en pasinta jaro vigle aktiva en multaj aferoj. Dum somero tio estis la Universala Kongreso en Montrealo, kiun vizitis kelkaj niaj membroj. IFEF-prezidantino Rodica Todor aktive partoprenis agadon de la UEA-komisionoj per retkonekto. Ĉi tiu maniero de kunvenado estas taŭga pro neneceso partopreni eventojn surloke, precipe tiam, kiam la kongresloko estas tiel malproksima de Eŭropo. Aliflanke ĝi estas malagrabla pro tempoŝovo, kiu devigas sidi ĉe komputilo dum noktaj horoj.

Ankaŭ aŭtunaj monatoj ne estis „trankvilaj” por la IFEF-estraro. Tuj en monatŝanĝo Septembro/Oktobro okazis estrarkunveno en Antverpeno. Membroj de la loka kongresa komitato konatigis nin kun lokoj, kie okazos la kongreso en la jaro 2023 kaj informis la estraron pri la stato de preparoj. Detalajn informojn vidu en IF 2022.6, paĝo 116.

Daŭrigo sur paĝo 4.

# Enhavo:

Estimataj gelegantoj ....................2
VERDEN-projekto progresas ....................4
Novaĵoj pri la IFEF-kongreso 2023 ....................5
Ekskursoj dum la 74-a IFK ....................7
Valonio atendas vin! ....................9
Fervoja stacidomo en Antverpeno ....................10
La 70-a datreveno de *FISAIC* ....................11
La plej longa trajno en la mondo ....................13
*SJ Euronight* – nova vino en malnovaj boteloj ....................13
Repliko al Taylor Hammerschmied ....................16
Nova *TGV* venis en Ĉeĥion ....................17
Rememoro al *InnoTrans* 2022 ....................18
Ana Medić (* 14.02.1925 - † 05.12.2022) ....................19
Honorigitaj membroj de IFEF ....................20
Titolpaĝo: Centra stacidomo en Roterdamo

**Internacia Fervojisto**
Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro
Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**
**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) prezidantino@ifef.net
**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net
**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net
**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net
**Gvidanto de la Faka Komisiono:** momente neokupita

**Membroj de la Redaktora Komisiono**
Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Membroj de la Faka Komisiono**
Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net
Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

**Bank-Konto:**
**Nomo:** „Laurent Vignaud"
**IBAN:** FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237
**BIC:** PSSTFRPPNTE
**UEA-konto:** iffk-o
**Retejo**: www.ifef.net
**Facebook:** https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372

Daŭrigo el paĝo 2.

Tuj en sekva monato Novembro, ekde la 4-a ĝis la 7-a, partoprenis IFEF-prezidantino kaj sekretario solenan aranĝon omaĝe de la 70-jara datreveno de FISAIC-fondiĝo en Strasburgo – *Bischheim*. La programo de la evento estis abunda. Krom tio estis ligitaj interesaj kontaktoj kun loka Esperanto-grupo kaj FISAIC-grupoj cele subteni kulturan programon dum la 74-a IFK en Belgio. Pliaj informoj pri la evento troviĝas en aktuala numero de la revuo Internacia Fervojisto.

Lasta aranĝo en la jaro 2022, kiun partoprenis IFEF-membroj estis VERDEN-kunveno en Roterdamo meze de Novembro. La kunveno estis pure labora. Ankaŭ pri ĝi vi povas legi en ĉi tiu numero de IF.

El la konciza trarigardo vi povas fari imagon pri aktivado de la fervojista E-movado en la pasinta jaro. La nun komenciĝanta jaro promesas alporti similan pretendeman programon por la IFEF – kongreso en Belgio, finpretigon de la projekto VERDEN, prezenton de ĝia rezulto dum UK en Torino, seminarion kunlabore kun Universitato Pardubice kaj aliajn.

En la nomo de la IFEF-estraro mi deziras al vi trankvilan kaj sukcesan novan jaron 2023.

**Via redaktoro**

## VERDEN-projekto progresas



Antaŭ la UEA-domo.

La tria VERDEN-kunveno okazis dum semajnfino de la 18-a ĝis 21-a de Novembro en Roterdamo en sidejo de UEA en *Nieuwe Binnenweg* 176 sub gvidado de Francesco Maurelli el firmao Kosmo. La kunvenon partoprenis reprezentantoj de ĉiuj organizaĵoj envolvitaj en la projekto – Kosmo (administranto de la projekto), IFEF, Franca Fervojista Esperanto-Asocio, Flandra Esperanto-Ligo, Esperanto-Asocio de „Giorgio Canuto“ el Parma, ĈeFEA kaj BEMI. **La projekto nun troviĝas** en la mezo de sia daŭro kaj la programo estis pro tio dediĉita al rerigardo al faritaj taskoj kaj



Dum laborkunsido. Foto J. Matuška

preparstato de restantaj aferoj – ĉefe broŝuro kun rezultoj de la dumjaraj klopodoj kaj preparo de la retejo specife pri transporto de bicikloj en trajnoj.

En programo de la kunveno estis ankaŭ prelegoj pri konflikto-solvado kaj tempo-mastrumado, kiuj vekis riĉan diskuton inter la gepartoprenantoj.

Interesa estis ankaŭ prelego de Pavlína Jalakšová el Forumo de Eŭropa Junularo, kiu parolis pri laboro de la organizaĵo.

Fine de la kunveno konatigis partoprenantojn Przemyslaw Wierzbowski el Pollando kun komputila programo *InDesign* por kreado de broŝuroj kaj aliaj presaĵoj.

Prezidantino de IFEF Rodica Todor en lasta tago de la kunveno substrekis la neceson pripensi influon de la projekto al lokaj organizaĵoj kaj institucioj, kie okazas la projekt-kunvenoj, por prezenti sencon de la projekto kaj postlasi tie konkretan efikon.



Prezidantino klarigas...
Foto J. Matuška

**Ladislav Kovář**

## NOVAĴOJ PRI LA IFEF-KONGRESO 2023




Majo 2023 rapide alproksimiĝas same kiel la IFEF-kongreso en Antverpeno 2023. Tio signifas ke la Loka Kongresa Komitato pene laboras pri la preparo.

Ni volas memorigi al vi ke la kongresejo troviĝas centre de la bela urbo Antverpeno. Do je promendistanco vi trovos ĉiujn utilaĵojn kaj vi povos ĝui diversajn arkitekturajn kaj kulturajn vidindaĵojn.

Se vi alvenos trajne, vi ne povos esti ne impresita de la mirinda ĉefa stacidomo pri kiu vi pli ekscios dum la dimanĉa ekskurso. Prelego pri tiu ĉi stacidomo kaj aliaj flandraj interesaj fervojkonstruaĵoj atendos vin dum la prelega programo.



Kongresejo

La urbo mem kaj ĝia riĉa historio estos la temo de alia dimanĉa ekskurso en la urbocentro. Multaj konstruaĵoj memorigas pri la glora pasinteco kaj nuntempo de la urbo.

Akvo kaj tero estas intime konektitaj en Antverpeno. La haveno, unu el la plej grandaj en Eŭropo, do ankaŭ nepre valoras viziton dum la tuttaga ekskurso en merkredo.



Saloneto

Belgio kaj fervojoj. Kiu ne scias, ke Belgio estis la unua lando de la eŭropa kontinento kie trajnoj veturis? Post tiu realigo belgoj ludis gravan rolon en la disvolvigo de fervojoj internacie, ĝis en Azio. En la bele aranĝita muzeo *Trainworld* (Bruselo) vi povas flari tiun gloran pasintecon dum fakekskurso. Prelego dediĉita al la rolo de belgoj en la disvolviĝo de fervojoj estos parto de la prelega programo. En *Maldegem* ni vizitos merkrede la ununuran funkciantan vaportrajnon de Flandrio.

Kompreneble vi ne nur venos al kongreso por turismumi. En la komforta kongresejo kun agrabla trinkejo kaj ripozejo, vi povos renkonti amikojn kaj konatulojn. Se la vetero konsentos vi eĉ povos sunumi vin en la korto.

Sendube vi ankaŭ volos pliriĉigi vian konon per diversaj prelegoj rilate al fervojistaj aferoj. Vi ekscios pli pri tio en posta numero.



Loĝĉambro

Lingvokurso estas kompreneble provizita kiel tradicia ingredienco dum Esperanto-kongreso kaj ankaŭ kelkaj surprizaj atelieroj atendos la neprelegemulojn.

Vespere vi povos malstreĉiĝi, ĝuante gamon de muziko: flandra popolmuziko, universala kaj flandra klasika muziko kaj eĉ muziko de esperantistoj.

Detalan superrigardon de ĉiuj ekskursoj vi trovos en la aparta kontribuo de Marc Cuffez, respondeculo de la ekskursoj, en ĉi tiu numero.

Sub la ligilo https://mallonge.net/ifef23fotaro vi trovos fotaron kun i.a. bildoj de la kongresejo.

Ni esperas ke tiu riĉa oferto povos konvinki vin veni al Antverpeno. Ne hezitu aliĝi!

Kvankvam je la momento de publikigo de ĉi tiu artikolo vi jam maltrafis la unuan aliĝperiodon, eblas ankoraŭ profiti la rabatitajn aliĝkotizojn de la dua periodo (ĝis la 15a de Februaro).

Notu ke aliĝintoj baldaŭ ricevos duan aliĝilon por aliĝi al ekskursoj. La dua kaj fina informilo atingos la aliĝintojn en Aprilo.

Koran bonvenon!

**Piet Glorieux** nome de IFEF2023-LKK, fotoj Yves Nevelsteen

## Ekskursoj dum la 74-a IFK

LKK de la 74-a IFK preparis por vi krom la ĉefa programo ankaŭ interesajn ekskursojn por konatigi vin kun la plej interesaj lokoj de la kongresurbo kaj fervoj-interesaĵoj.

**Duontaga ekskurso** (dimanĉe 7-an de Majo, posttagmeze je la 14,30 h)




Urbodomo kaj *Grote Markt*

La unua ekskurso estos duontaga kaj estos fakte duobla – vi devos decidi, kiun partopreni. Ambaŭ ekskursoj okazos piede.

D1 - la unua promeno gvidos vin al malnova centro de Antverpeno kun vizito de la ĉefa placo *Groenplaats*, katedralo, urbodomo kaj rivero Skeldo. Gvidos vin s-ro Vladimir Ronin – sperta esperantisto kaj bona konanto de la urbo.

D2 - celo de la dua promeno estas la fama centra stacidomo kaj la juda kvartalo. La arkitektan juvelon, kiu la stacidomo fakte estas, prezentos al vi s-ino Ella Strug, la prezidantino de la Antverpena Grupo la Verda Stelo.



*Schaarbeek* muzeo
Wikimedia, Smiley.toerist

**F1 – Faka ekskurso** – okazos marde la 9-an de Majo kun foriro je la 13-a horo de la junulargastejo al metroo kaj al la centra stacidomo. De ĉi tie trajne je la 13:39 h al *Schaarbeek* (en Brusela ĉefurba regiono). Tie estos libera vizito de la muzeo. Ĉiu partoprenanto ricevos folion kun esperantlingvaj klarigoj. Revojaĝo okazos per la sama vojo – trajne el *Schaarbeek* je la 16:54 h (aŭ 17:20 h) al Antverpeno - centra stacidomo kaj plu per metroo kaj piede al junulargastejo.

T1 **– Tuttaga ekskurso** (merkrede la 10-an de Majo)

Foriro de la junulargastejo al busparkejo je la 8:40 h. Je la 9-a horo foriros buso al haveno Antverpeno, kie nin ĉiĉeronos s-ro Paul De

Cooman. Post promeno en la haveno je la 11-a horo ni translokiĝos al *Adegem* por tagmanĝo (pantagmanĝo: pano kun fromaĝo, ŝinko kaj salato kun kafo aŭ teo). Je la 13:30 h ni foriros al la stacidomo *Maldegem*, de kie ni veturos je la 14-a horo per trajno kun mallarĝa ŝpuro trakciata per vaporlokomotivo al muzeo. Ĉirkaŭ la 16-a horo estos foriro al Antverpeno, alveno en la junulargastejo ĉirkaŭ la 18-a horo.



Antverpena haveno. Wikimedia, Alacoolwiki

Prezoj kaj aliĝilo por la ekskursoj estos haveblaj fine de Januaro.
Aliĝi kaj pagi por ekskursoj estos eble ĝis fino de Marto.
Ĉiuj, kiuj jam aliĝis al la kongreso ricevos fine de Januaro novan aliĝilon.
**Marc Cuffez**

## VALONIO atendas vin!

Ĉu vi jam aliĝis al postkongreso en *Charleroi*? *Charleroi* kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas ĉefe konataj kiel industria regiono, sed ĝi abundas ankaŭ per belega naturo, ĉarmaj historiaj urboj, kulturaj kaj teknikaj interesaĵoj pri kiuj vi povas legi en la aliĝilo al la postkongreso, kiu aperis en la pasinta numero de la Internacia Fervojisto.



*Charleroi* – sonorilturo Wikimedia, Jmh2o

Loĝado por post-kongresanoj estas certigita en junulara hejmo (*Rue du Bastion d'Egmont 3, 6000 Charleroi.*) proksime de stacidomo. La unua vizito gvidos al *Marcinelle* (parto de *Charleroi*), kie estas industria heredaĵo – ekskarbominejo „Bois du Cazier”.

La sabata ekskurso gvidos al *Namur* – Valona ĉefurbo, sidejo de valonia registaro kaj parlamento. La urbo mem havas 2000-jaran

historion, kiun vi povos enspiri dum promenoj tra urbaj stratetoj, bazaro, citadelo ktp.

La antaŭlasta tago estas dediĉita al vizito de teknika „miraklo" – ŝiplifto *Strépy-Thieu*. Imagu – peza, miltuna ŝipo leviĝas pli ol 70 metrojn supre. Tio estas nepre necese vidi. Venu kaj ĝuu nian belan regionon kaj ... ne forgesu vian fotilon!!!!



*Namur* vespere, Wikimedia



Strépy-Thieu,
Wikimedia, J.P. Grandmont

**Michèle Villers**

## Fervoja stacidomo en Antverpeno (resumo de la ĉefa prelego dum la 74-a IFK)



La ĉefstacidomo en Antverpeno estas unu el la plej belaj malnovaj stacidomoj en la mondo. Fervoja linio al Antverpeno estis konstruata en la jaro 1836. La konstruado de tegmento super la kajoj okazis inter la jaroj 1895 kaj 1899. La ĉefan konstruaĵon kun giĉetoj kaj oficejoj oni konstruis inter la jaroj 1899 kaj 1906. Tiujn juvelojn de la inĝeniera arto kaj arkitekturo ni povas admiri ĝis nun. Inter la jaroj 1998 kaj 2006 oni realigis la renovigon de la malnovaj konstruaĵoj. Samtempe oni tute ŝanĝis la sistemon de la fervojaj trakoj al 3-etaĝa sistemo. La taga lumo atingas eĉ la plej profundan parton de la stacidomo. Tiamaniere ĝi fariĝis ankoraŭ pli speciala.

**Ella Strug**

## La 70-a datreveno de *FISAIC*

*FISAIC* estas la Internacia Federacio de Fervojistoj pri Arto kaj Kulturo, kiu estis fondita en Strasburgo en la jaro 1952.

*FISAIC* celas antaŭenigi kaj subteni la kulturajn agadojn de la fervojaj laboristoj de ĉiuj nacioj en libera tempo, establi rilatojn inter la asocioj kaj la naciaj sindikatoj por organizi kulturajn eventojn kaj kontribui al disvolviĝo de stimuloj kaj kulturaj agadoj.

Post 70 jaroj, de la 4-a ĝis la 7-a de Novembro 2022, oni revenis al Strasburgo kaj *Bischheim,* por festi ĝian datrevenon en la sama urbo, kie ĝi naskiĝis.

La programo inkluzivis instituciajn kaj organizajn kunvenojn (Ĝenerala Asembleo kaj Komisionoj), kulturajn vesperojn, vizitojn al la urbo kaj al la regiono kaj ekspoziciojn de la agadoj de la *FISAIC*-grupoj. Samtempe la gastiganta sekcio *UAICF* (*Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots Français*) prezentis ekspozicion de francaj kulturaj grupoj en gimnastikejo najbara al la fervoja stacidomo de Strasburgo.




La bonvenan paroladon faris la prezidanto de *UAICF*, s-ro Ghislain Heinen. La voĉdonoj estis okazigataj dum la Ĝenerala Asembleo por elekti la novan estraron kaj la kunordiganton de la teknikaj komitatoj dum la sekvaj du jaroj kaj aprobon de financaj buĝetoj. Por IFEF

partoprenis okazigojn la prezidantino Rodica Todor.

Honoraj medaloj pro iliaj agadoj estis transdonitaj al kelkaj membroj: Ankaŭ la IFEF-membroj Lene Niemann (DK) kaj Wiesław Libner (PL) ricevis ilin.

En urbo *Bischheim*, kelkajn kilometrojn for de Strasburgo, fervoja centro kun uzinoj kaj aliaj instalaĵoj, la asembleoj estis aranĝataj en kunvenejoj de *SNCF*, la ekspozicioj en la komunuma salono *„Salle du Cheval Blanc”* kaj la kulturaj vesperoj en la teatro *„Salle du Cercle”*.

IFEF ankaŭ partoprenis la ekspozicion kun informa materialo pri Esperanto kaj pri la agado de IFEF.
Vito Tornillo kaj Bruno Henry ĉeestis la standon, donante multajn informojn al la vizitantoj kaj al la ekspoziciantoj de aliaj agadoj.

La kongresanoj kun siaj kunuloj povis admiri Strasburgon de la rivero per boata veturo, la allogan *Colmar*-on kaj aliajn lokojn de Alzaco.
En kulturaj vesperoj sinprezentis la *Luksemburga Koruso* kaj la folklora Grupo de la Orient-Franca Fervoja Regiono. Por IFEF estis ŝanco oferti konkretan kunlaboron por estontaj komunaj programoj, ekkoni la reprezentantojn de la landaj asocioj kaj de la kulturaj grupoj.
Kiel esperantistoj, ni havis okazon trovi kaj retrovi samideanajn amikojn de la regiono kaj havi ŝancon, ne malpli favoran, fari grupan foton sub la ŝildo de *„Rue Esperanto”* en *Bischheim*.




Dankon al la organizantoj kaj al ĉiuj partoprenantoj, kiuj kontribuis al la sukceso de la evento.
Dankon ankaŭ al Bruno Flochon, la prezidanto de la Esperanta Asocio de Strasburgo, kiu intervjuis min kaj metis filmeton en *youtube*-kanalon de la asocio.
Ĉio videblas ĉe ĉi tiu kunligo:

https://youtu.be/9bAQgMs-eWU.

**Vito Tornillo**

## La plej longa trajno en la mondo.

Svisoj ekveturigis la plej longan pasaĝertrajnon en la mondo. La vagonaro, mezuris preskaŭ du kilometrojn.

Svisa fervojkompanio *Rhätische Bahn* ektrafikigis 1,9 km longan trajnon kunmetitan el cento da vagonoj. Ĝi certigis tiel rekordon de la plej longa pasaĝera trajno en la mondo kiu traveturis unu el la plej mirigaj fervojlinioj de la Alpoj.

La traceo tra kiu la vagonaro veturis, estis en la jaro 2008 enskribita en liston de monda heredaĵo de UNESCO. Ĝi kondukas tra 22 tuneloj kaj trans 48 pontoj, inkluzive la mondfaman kurbigitan viadukton *Landwasser*.



Sur *Landwasser* ponto
Foto: Dionysius Hungerbühler

Tuta veturo de la plej longa trajno en la mondo daŭris pli ol unu horon. Fervojentuziasmuloj staris apud 25 km longa fervojlinio por ĝui rigardon al cento da vagonoj serpentumantaj sub montopintoj de svislandaj Alpoj.

Direktoro de *Rhätische Bahn* Renato Fasciati menciis, ke celo de la evento estis prezenti teknikajn sukcesojn de Svislando kaj festi 175 jarojn de svisaj fervojoj.

**Ladislav Kovář** Fonto: retejo Idnes.cz, 30.10.2022

## *SJ Euronight* - nova vino en malnovaj boteloj

- aŭ malnova vino en novaj boteloj – aŭ ĉu nur nova etikedo?

Dum la lastpasintaj (multaj) jaroj ne plu veturas noktaj trajnoj inter „Nordio” kaj Eŭropo. Sed ekde la 1-a de Septembro 2022 denove

veturas ĉiutage nokta trajno *Stockholm – Malmö – Kastrup* (kopenhaga flughaveno) – *Hamburg* kaj same reen.
La kontrakton havas la Svedaj Ŝtatfervojoj SJ (*Statens Järnvägar*) kun la germana fako de *RDC* (*Railroad Development Corporation*) por kvar jaroj.



*SJ* nokta trajno – kuŝvagono, Foto: *SJ*

Uzataj lokomotivoj estas svedaj, danaj kaj germanaj, laŭ la lokaj reguloj kaj sistemoj. Same la permesoj necesaj kaj la personaro estas de ĉiuj tri landoj, kiam oni tie veturas. La vagonojn oni luas ĉe *RDC*, kaj ili dumsomere iris al Svedio. Ili estis tie ekipitaj per nova *SJ Euronight-insigno k.s*. La ĝeneralan klientrespondecon havas la sveda ŝtata fervojekspluata entrepreno *SJ Trafikledning*.

La trajno, kiu unufoje tage veturas en ambaŭ direktoj, havas lokon por 300 pasaĝeroj. En la 11 kuŝvagonoj kaj 5 sidvagonoj estas jenaj kategorioj:

- Unuaklasa dormloko
- Duaklasa dormloko
- Duaklasa kuŝloko
- Duaklasa sidloko

La ordinaraj prezoj estos inter 30 kaj 95 €, sed kiel kutime pri biletoj: Kiam oni frue mendas, estas eblecoj havi malpli altan prezon. Oni vendas biletojn en multaj kanaloj – en la tri landoj rete - por krei intereson, kaj oni esperas pri posta plilongigo de la itinero al/de ekz-e *Göteborg – Oslo.*

La horaro: Foriro *Stockholm* 17,34, alveno *Hamburg* 06,35
Foriro *Hamburg* 21.55, alveno *Stockholm* 09.55

Jen la ĉefa enhavo de prelego, kiun mi kun granda intereso atendis. Ĝi okazis kadre de *NJS*, faka forumo por nordia fervojrilata kunlaboro, kaj la projekton prezentis homo, kiu laboras ĉe *SJ* dum 9 jaroj.
Mi iom perdis la esperon.

La preleganto prezentis la projekton kiel tute novan aferon. Lia tuta

prezento kaj lia scio pri antaŭaj noktaj trajnoj montris, ke li nenion scias de „antaŭ 9 jaroj”. Pri tekniko li nenion povis respondi, kaj fakte estis multaj demandoj ĝuste pri tio. Pri tio oni ne povas riproĉi lin, li estas projektgvidanto kaj ne teknikisto, sed tamen li povus kunporti ’ion’.

Antaŭ la liberaligo de fervojekspluatado, kiam oni komencis investi en nur nacia kaj regiona trafiko, ekzistis nokta trajno kun la nomo „Alfred Nobel”, kiu veturis precize laŭ la sama itinero kaj laŭ pli-malpli la sama horaro. La sola diferenco estas, ke „Alfred Nobel” ne havis halton por pasaĝeroj en Danio.
La prezentitaj vagonoj aspektis kiel la laste uzataj svedaj kaj germanaj nokttrajnaj vagonoj - fakte ili estis interne pli moderne ekipitaj, ol montris la bildoj de tiuj novaj vagonoj.
La preleganto ne povis diri, de kie oni havas la vagonojn – sed la fakto, ke oni luas de *RDC* ja montras, ke ili certe ne estas novaj. Oni surgluas *„SJ”*, kaj ek!

La prezento kaj la preleganto montras, ke la fervojoj ekspluatas homojn, kiuj ne konas la historion, kaj kiuj ne SERĈAS la historion por eble profiti je jam faritaj spertoj. Anstataŭe oni inventas denove „la profundan teleron”, kiel ni diras en la dana.

Domaĝe, ke la fervojoj ne uzas la strategion „lerni de la historio”. Domaĝe, ke la fervojoj en la 1990-aj jaroj ne investis en verda kaj daŭripova publika trafiko kaj sekve nun batalas por trovi kaj havi sian „etan lokon” – la aviadila trafiko, malgraŭ evidenta klimatkrizo, malgraŭ pandemio, jam gajnis - kaj estas TRE malfacile turni la evoluon.

ALIFLANKE kompreneble oni devas ĝoji, ke tiu projekto (kaj aliaj similaj) povas veki intereson vojaĝi per trajno.

Fonto: NJS-prelego, junio 2022

Daŭrigo 17/10-2022:

Ĵus venis al mi la membrobulteno de „Fervojklubo de Nordio”, *Nordisk Jernbanenyt*. En tiu bulteno oni interŝanĝas novaĵojn kaj spertojn. Estas ĉiam tre interese legi ĝin.

En tiu numero (169) sur paĝo 6 estas titolo: „Malfacila komenco por

la noktaj trajnoj de *SJ*". Dum somero montriĝis, ke *RDC* ne povis liveri ĉiujn menditajn aŭstrajn dormvagonojn ĝustatempe (mankis kvin). Sekve *SJ* ĉesis vendi dormlok-biletojn, sed en Aŭgusto *RDC* sukcesis liveri kvin ALIAJN dormvagonojn kiel portempa anstataŭo. Granda estis ĝojo ĉe *SJ* … sed mallonga ĝi estis ankaŭ, ĉar la 25-an de Aŭgusto la dana instanco *Trafikstyrelsen* informis, ke ili ne povas aprobi la vagonojn por trafiko en Danio. Laŭ „La kvara eŭropa fervojpakaĵo" vagonoj por internacia trafiko devas esti registritaj kaj aprobitaj ĉe la eŭropa fervoja agentejo *ERA*.

Tio koncernis ne nur tiujn kvin dormvagonojn, sed ankaŭ sidvagonojn, kiujn oni intencis uzi. Do, por tiuj vagonoj nun okazas aproba provo. La litvagonoj, kiujn oni volas uzi, havas jam la aprobon. Sed – en la unua nokto la trajno veturis kun nur tri litvagonoj *Stockholm-Hamburg* kaj inverse. La venontan tagon kun nur du litvagonoj. Oni esperas pri plibonigo!

JUN, Fonto: *Nordisk Jernbanenyt* 169, Oktobro 2022

## **Repliko al Taylor Hammerschmied** (IF 2022.5)

Kiel mi jam antaŭe rimarkigis, mi kun granda intereso legis viajn artikolojn en IF. Al la artikolo en IF 2022.5 mi havas specifan rimarkon, pli precize al la alineo:

*„Kiam la linio "Inlandsbanan" estis kompletigita dum la jaro 1937, ĝi estis sen elektrizo. La karbo prizorgis la funkciigon. Restis du jaroj ĝis komenco de la dua mondomilito kun denova manko de karbo, kaj aldone benzino kaj dizelbrulaĵo. Sed tion oni ne certe sciis kaj ne kuraĝis antaŭvidi dum la malferma ceremonio*."

Pri la historio mi legis en Vikipedio.

La ĉefa kaŭzo por konstrui *Inlandsbanan* estis krei „ĉeflinion" por nutri la komercan vivon en la norda kaj meza sveda landinterno, sed ankaŭ, por ke la linio estu en milita tempo malŝarĝa linio por la armea linio „Norda Bazlinio".

Do, laŭ historiaj faktoj kaj laŭ mia konkludo, kiel multjara fervojisto, la decido lasi *Inlandsbanan* sen kurento ne estas obstina kliniĝo al „nigra energio", sed ankaŭ rezulto de konscia argumentado.

Notu bone la frazon post *„sed ankaŭ"* supre (p. 105) – fervojo, kiu

dependas de kurento por funkcii, estas tre vundigebla dum ekz-e milito. Oni havis tiun linion kun sufiĉe multaj branĉlinioj, kie oni ĉe pluraj el ili dum la Dua Mondmilito kaj dum la komenco de „la malvarma milito” deponis vaporlokomotivojn kaj karbon … certa saĝeco! Oni povis trafiki per „stacio-distanco-sistemo” sen dumvojaj signaliloj uzante krom la jam konstruitaj stacidomoj ankaŭ la inter-staciajn devanctrakojn kiel provizoraj stacioj. Do, nek loke detruitaj trakoj nek detruita kurentprovizo povis plene haltigi veturadojn sur tiu strategie grava linio.

Nur komence de la 1980-aj jaroj *SJ* (la svedaj ŝtatfervojoj) komencis forvendi la strategi-rezervon de vaporlokomotivoj, kiujn oni dum jardekoj bone konservis en simplaj lignaj remizoj ĉe branĉotrakoj laŭlonge de la *Inlandsbanan*.

Do, memoru, ne ĉiam juĝi la farojn de niaj antaŭuloj per la scio, kion oni nun havas – nepre konsideri la kompletan historion pri pli fruaj tempoj – sen scii nian historion ni pli pretas ripeti antaŭajn erarojn aŭ pensi, ke niaj nunaj solvoj estas la plej saĝaj.

**JUN**

## Nova *TGV* venis en Ĉeĥion

En Decembro 2022 alveturis en Ĉeĥion la plej moderna franca grandrapida motorunuo *TGV*. La duetaĝan vagonkombinaĵon *Avelia Horizon* testos francaj fakuloj en provringo *Velim*. En pasaĝer-trafikon ĝi venos en la jaro 2024.



*TGV Avelia Horizon*, ilustraĵo, fonto retejo *Alstom*


La motorunuo pro-duktita de kompanio *Alstom* venis al Ĉeĥio el Aŭstrio kaj trans Prago atingis provringon *Ve-lim* de Fervoja Esplor-Instituto (VÚŽ).

Laŭ la produktanto estas la vagonkombi-naĵo unusola duetaĝa trajno kiu kapablas veturi pli rapide ol 300 km/h. Kompare kun antaŭa

generacio de duetaĝaj vagonkombi-naĵoj ĝi proponas je kvinono pli da lokoj por pasaĝeroj, maksimume 740 transportataj personoj. Lastfoje estis TGV videbla en Ĉeĥio dum somero 2022. Historian motorunuon produktitan en la jaro 1980 alportis ĉeĥa fervojadministracio por propagi preparon de grandrapidaj fervojlinioj en la lando.

**Ladislav Kovář**, laŭ retejo Echo24.cz

## Rememoro al *InnoTrans* 2022




Post interrompo kaŭzita de kovid-pandemio okazis en tagoj de 20-a ĝis 23-a Septembro 2022 jam la dektria internacia foiro de transport-tekniko *InnoTrans* 2022. En 42 haloj kaj sur ekstera ekspozicia areo prezentis novajn produktojn 2 834 ekspoziciantoj el 56 landoj. Vizitantoj povis admiri 250 mondajn novaĵojn, 124 veturilojn sur 3 500 metroj da trakoj kaj 14 busojn. Inter ekspoziciantoj estis 29 internaciaj asocioj, 15 industriaj asocioj kaj 20 transport-kompanioj.












La pasintjara foiro estis celita al daŭripova movkapableco. Dum

inaŭguro diris direktorino de la foiro s-rino Karstin Schulz: *„InnoTrans* ofertas kovron de merkato, kiu ne havas analogion en la mondo. Produktoj kaj servoj inkludas trakciilajn sistemojn, busojn, kiber-netikan sekurecon, *ERTMS-on*, artefaritan intelekton, bontenadon, tramojn, hidrogenajn trajnojn kaj veturilojn kun dusistema reĝimo.”

Dum la foiro okazis ankaŭ tradiciaj aranĝoj, ekz. konferenco de gvidĉefoj de fervojtrafiko, dialog-forumo, scienca konferenco pri estonteco de movkpableco kaj aliaj.

**Ladislav Kovář**

## Ana Medić (* 14.02.1925 - † 05.12.2022)



La 5-an de Decembro 2022 mortis en la 98-jaro elstara membrino de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA). S-rino Medić naskiĝis la 14-an de Februaro 1925 en *Zagreb*. En la jaro 1947 ŝi komencis labori en Fervoja Proviza Entrepreno en *Zagreb*. Ekde 1957 s-rino Medić fariĝis membrino de tiama Fervojista Esperanto-Societo *Zagreb* (FES) kaj estis aktiva 50 jarojn. Ana tajpis tekstojn en stencilojn por ciklostila multobligo de ekzempleroj de revuo "Jugoslavia Fervojisto", oficiala organo de tiama Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE). Ankaŭ ŝi ofte tajpis eldonojn de historio de FES *Zagreb* okaze de jubileaj jaroj por printi kaj aliajn FES-materialojn. Precipe meritoj estas en ŝia diligenta laboro en preparoj de materialoj por 33-a kongreso de IFEF en 1986 en *Skopje* en eksa Jugoslavio (tiama respubliko Makedonio - nun memstara ŝtato Norda Makedonio). Ofte ŝi partoprenis IFEF-kongresojn kaj esperantajn landajn manifestaciojn. Ana Medić estis multjara sekretariino de FES *Zagreb*, inter la jaroj 1966 kaj 1986.

La funebra ceremonio okazis en krematorio en zagreba tombejo *Mirogoj* kiun ĉeestis ankaŭ membroj de KFEA kaj aldonis du parolojn je honoro al s-ino Ana.

S-rino Medić restas en niaj memoroj kiel kara persono. Ni sincere kondolencas al ŝiaj familianoj kaj geamikoj. Gloron al ŝi kaj ŝi ripozu en paco.

**Zlatko Hinšt**

# Honorigitaj membroj de IFEF

## Honora Prezidanto de IFEF

| | | |
|---|---|---|
| D-ro Bolognesi, Romano | Italio | 2009 |

## Honoraj Membroj de IFEF

| | | |
|---|---|---|
| Nobuki, Naosuke | Japanio | 2006 |
| Robiolle, Pierre | Francio | 2007 |
| Stuppnig, Martin | Aŭstrio | 2008 |
| Inĝ. Gulyás, István | Hungario | 2009 |
| Brletić, Marica | Kroatio | 2010 |
| Ripoche, Jean | Francio | 2010 |
| Tomíšek, Jindřich | Ĉeĥio | 2016 |
| Litov, Georgi | Bulgario | 2016 |
| Inĝ. Kovář, Ladislav | Ĉeĥio | 2018 |
| Niemann, Jan Uldal | Danio | 2021 |
| PhDr Abelovská Anna | Ĉeĥio | 2022 |

## Honoraj Membroj de FISAIC

| | | |
|---|---|---|
| PhDr. Abelovská, Anna | Ĉeĥio | 2006 |

## Honorigitoj per speciala FISAIC-medalo

| | | |
|---|---|---|
| Robiolle, Pierre | Francio | 1994 |
| Tomíšek, Jindřich | Ĉeĥio | 2012 |
| Niemann Jan | Danio | 2021 |
| Niemann Lene | Danio | 2022 |
| Libner Wiesław | Pollando | 2022 |

## Honora Patrona Komitato de IFEF

| | | |
|---|---|---|
| Inĝ. Rodak, Aleksander | Pollando | 1987 |
| Zelenka, Vojtěch | Ĉeĥio | 2003 |
| PhDr. Abelovská, Anna | Ĉeĥio | 2011 |